

Babiladaj rondoj

... okazos je la 19-a, vendrede

la 22-an de marto

ĉe Francisko

Vallombreuse 14 en Laŭzano

Tel. 076 411 14 55



La 12-an de aprilo

ĉe Françoise je la 19h30

Bel-Air 101 en La Tour-de-Peilz

Tel. 079 517 44 43



La 26-an de aprilo

ĉe Gilbert je la 19a

Ch. de L'Orme 6, Morrens

Tél. 021 732 23 22

Aliĝu ĉe

<http://doodle.com/teum7w3gz46vdy6>

Respondo pri la enigmo:

Nenio estas pli bona ol Dio.

Nenio estas pli malbona ol satano.

La malriĉoj havas **nenion**.

La riĉoj bezonas **nenion**.

Se ni manĝas **nenion**, ni mortos.



*Ĉu vi scias, kie situas tiu
memorinda plato?*



Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Bühlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte

Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin *

076 411 14 55 - Kasisto: Françoise Petermann * 079 517 44 43 -

Redaktoro de la informilo: Knud Sunier * 021 961 38 56

Informilo

aprilo 2013 - n° 4

Al nia venonta kunsido venu por ludi :

Ni demandos al vi ...

"Ĉu vi bone konas nian landon?"

Lunde, la 1-an de aprilo 2013

je la 20-a, ĉe la unua etaĝo

de la laŭzana stacidoma bufedo

Lunde la 6-an de majo

Decidota

Sabate la 15-an de junio

Jara ekskurso. (ankoraŭ iomete surprizo...)

... kaj somera paŭzo ...

tamen ne vere, ĉar vi aligu viajn ĉeestojn en la bazar:

<http://www.doodle.com/5eaxhdsx4sh8vru4>

Lunde la 2-an de septembro

Projekciado de filmoj

Lunde la 7-an de oktobro

Decidota

Laŭzana Esperanto-Societo

... daŭrigo

INSTRUISTO DUNGĜŬO

RENKONTAS LUPON

(15-a teksto el Vere aŭ Fantazie de Claude Piron)

Feliĉe, ĉi-lasta sukcesis flanken salti kaj iris kaŝi sin malantaŭ la azeno. La lupu ree kaj ree provis salti sur la instruiston, sed ĉiufoje malsukcesis. Tamen, kompatinda Dungĝo sentis, ke li pli kaj pli malfacile spiras. Li ankoraŭ ne estis maljuna, sed li ne pli estis juna viro, kaj tute ne kutimis sporti. La konstanta tro rapida movado pli kaj pli forprenis liajn fortojn, ĝis li sentis, ke ne plu longe li eltenos.

Li ege bedaŭris sian kompaton. Li koleris same al si kiel al la lupu. Sed bedaŭro neniam praktike helpas en danĝera situacio, kaj li komencis malesperi, kiam alvenis maljuna kamparano, trankvile paŝanta sur la vojo.

"Sinjoro maljunulo, sinjoro maljunulo!" li vokis. "Helpu min, savu min!"

"Kio okazas?" la maljunulo demandis.

"Tiu lupu, tiu malbona bestaĉo... Mi savis ĝin de la soldatoj, kiuj volis ĝin mortigi, kaj ĝi volas manĝi min."

"Nevere! Nevere! Kiel vi kuraĝas tion diri, vi malaminda malverulo!" la lupu kriis. "Li ligis miajn kruojn per ŝnuro, li metis min en sakon, li aldonis librojn sur min: klare, li volis min mortigi. Necesas liberigi la mondon je tia danĝera homaĉo. Tion mi volis fari manĝante lin."

"Aĉulo! Vi aĉa bestaĉo! Eĉ ne unu vorto via esprimas plej simplan veron. Mi..."

"Silentu," la maljunulo diris. "Mi estos la juĝisto. Mi kredas nek vin, nek vin," li diris plu, turnante sin jen al s-ro Dungĝo, jen al la lupu.

"Sed..." la lupu komencis.

"Silentu, mi diris!" La maljunulo ne lasis ĝin paroli. En lia voĉo estis tiom da personeca forto, ke la lupu ne provis daŭrigi.

Ĝi fakte elmontris timon.

"Mi kredas nenium el vi," la kamparano ripetis. "Kaj la kaŭzo de mia nekredo estas, ke ne eblas meti tian grandan lupon en tian malgrandan sakon."

"Ho jes, estas eble, tio okazis," la lupu diris, kolera, ke oni ne kredas ĝuste tiun parton de lia rakonto, kiu estas vera.

"Ne. Tion mi ne povas kredi. Mi bezonus vidi propraokule."

"Se vi volas..." la lupu diris. Kaj li ekkuŝis sur la tero, prezentis la kruojn al s-ro Dungĝo, lasis tiun ligi ilin kaj ilin forte premi per la ŝnuro, kaj poste enigi ĝin en la sakon.

Tiam la maljuna kamparano sin turnis al la instruisto:

"Jen. Nun, ĝi ne plu povas fari malbonon al ni. Ni batu ĝin ĝis-morte."

Tion ili faris.

"Mi rekonis vin," la maljunulo klarigis. "Vi estas instruisto Dungĝo, la homo plej bonkora al ĉiuj bestoj. Bonkori estas plaĉe al la koro, ĉu ne? Oni sentas sin granda kaj valora kaj pura. Kaj tio ofte estas bonega sinteno. Sed kredu min, bonkori al malbonulo, tio estas kuraĝigi lin malboni eĉ pli. Espereble la instruon vi memoros, instruisto!"

Kaj li paŝis for eĉ ne atendante dankon.